

& Konsiloj al malĝoja amikino:

< Rekante 23 el 31 batoj por strofo, entute 589 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio el Transtrand, Svedujo, kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:31> (/LaTi dore mimi somi; fimi midi LaLa Lado;

(#Rekantaĵe: Ti So So Tilre doLa La La; <[la:do]> do do do redo TiLa SoFa So oLa; SolFa MilRe MilRe DolTi Do lDolRelMi Do o)

)×19)+

(& Strofoj:

'1 /Lernu vin, ho kara, ŝati, ; ĉar ne helpas sin kompati.

(×: **Jen ŝanĝiĝo2s via sorto ; Dancu nun kun fiera rekta dorso ; Je2n ŝa2nĝi2ĝo2s vi4a sort'**.)

'2 Se vi estas por vi blinda, ; mankas memestimo inda.

'3 Ĉar ja estas sed kaj tamen, ; vi neniam diru amen!

'4 Se necesas, eĉ adultu, ; sed neniam simple stultu.

'5 Vi ne estu ŝaf' kaj predo ; aŭ citrona in' aŭ led.

'6 Estu freŝa, estu forta, ; se necesas, eĉ senvorta.

'7 Estu, kiam ajn, kuraĝa, ; kaj ĉe l' fin' de l' vivo saĝa.

'8 Flugu sola al la Luno, ; brilu ene kiel suno.

'9 Lernu esti sen modesto, ; jen la viv' fariĝas festo.

'10 Honesteco ne sufiĉas, ; se vi tamen sklavo iĝas.

'11 Dependigu vin ne ĉiam ; kaj se eblas, eĉ ne iam.

'12 Se vi pri vi mem nur dubas, ; via tuta vivo rubas.

'13 Kara, serĉu al vi celon, ; serĉu veron, serĉu belon.

'14 Iĝu lerta vivartisto ; kaj konsciu pri rezisto.

'15 Se vi lernos mem vin ami, ; jen vi scios ankaŭ dami.

'16 Al fiuloj ĵetu ganton, ; Ne adoru plu la vant.

'17 Vivu ne nur do por plaĉi, ; tia vivo devas aĉi.

'18 Spitu do al la postulo ; plaĉi volas ina nulo.

'19 Se vi ĉion el vi kreos ; kaj ne plendos kaj ne veos,)